
# NIAJ VIVOJ, SANO KAJ RAJTOJ ESTU SUPER LA PRIVATAJ INTERESOJ DE ENTREPRENOJ KAJ MERKATOJ

**Se zorgas vin la sekvoj de la traktatoj por "libera" komerco, bonvolu disvastigi ĉi tiun informon.**
**Ja multo estas en risko.**

**Pli da informo por partopreni (subskribadoj, agoj...):**

http://asturiasnoalostratadosdelibrecomercio.noblogs.org
kaj fontoj tie referencitaj

**Retpoŝto:** asturiasnotlc@autistici.org




# ASTURIO POR LA SANO, LA DEMOKRATIO KAJ LA PUBLIKAJ SERVOJ

## NE AL LA TRAKTATOJ POR "LIBERA" KOMERCO

**Kiu estas kiu:**

* **TTIP (“*Transatlantic Trade and Investment Partnership*”, “Transatlantika Komerca kaj Investa Partnerado”)**: Ĝi intencas establi Areon de Libera Komerco inter Usono kaj Eŭropa Unio. Ĝi estas danĝero al demokratio, socio kaj ekologio.

* **CETA (“*Comprehensive Economic and Trade Agreement*”, “Vasta Konsento pri Ekonomio kaj Komerco”)**: Tre simila al TTIP sed inter Kanado kaj Eŭropa Unio. Multaj nomas ĝin “provbalono” por esplori la vojon antaŭ ol la enkonduko de la usona TTIP.

* **TiSA (“*Trade in Services Agreement*”, “Konsento pri Komerco en Servoj”)**: Ĝia celo estas trudi ĝeneraligadon de privatigo de publikaj servoj.

* **EPA (“*Economic Partnership Agreements*”, “Konsentoj pri Ekonomia Partnereco”)**: Ili estas ekonomiaj akordoj inter Eŭropa Unio kaj regnoj mone malriĉaj de Afriko, Azio kaj Pacifiko, por trudi malaperigon de protektismaj demarŝoj establitaj en tiuj regnoj por protekti sin kontraŭ maljusta konkurenco kun la fortaj novliberalismaj ekonomioj tre intensaj kaj industriigitaj.

**Kial «NE» al la liber-komercaj traktatoj**

Ĉar ili respondas al interesoj nur de kompanioj, grandaj entreprenoj kaj financaj grupoj, kaj ili estas kontraŭ la ĝeneralaj interesoj de la popolo, la demokratio kaj la publikaj servoj.

* Ili estas intertraktataj "trans fermita pordo" inter politikistoj kaj reprezentantoj de kompanioj, grandaj entreprenoj kaj financaj grupoj, maldiafane kaj obskurisme, rifuzante kaj malebligante partoprenon de popolo kaj ĝian rajton je informado.

* Ili limigas demokration neinversigeble: se subskribite de Eŭropa Unio, neniu regno membro povos aprobi demarŝon kontraŭan al la traktatoj, malebligante al la popolo efektivigi sian demokratian volon. Oni kreus kontraŭdemokratan interregnan reg-organon super la ekzistantaj demokratiaj regnoj kaj sistemoj.

* Ili malpermesas ke la demokratiaj parlamentoj kaj registaroj aprobu decidojn kiuj povus efiki negative al la ekonomiaj interesoj propraj de la kompanioj, grandaj entreprenoj kaj financaj grupoj, kaj kreiĝas sistemo de "interregnaj ekonomiaj juĝejoj" super la justicaj sistemoj de la regnoj (ISDS) por trudi ke tiel ĝi estu. Tio implicas la maleblon establi demarŝojn por pli granda publika kaj demokratia kontrolo de la ekonomio (pri kio la nuna "krizo" pruvis ke ili estas necesaj), por plibonigi la garantiojn kaj laborrajtojn de la laboristoj, aŭ la malpermeso de substancoj (kiel endokrinaj modifantoj) kaj agadoj potenciale danĝeraj por la homoj aŭ la medio laŭ la "principo de antaŭzorgo" (abolota).

* Rilate al la sociaj kaj fundamentaj servoj (garantioj de plenumado de homaj rajtoj kaj bezonoj) estkiel la edukado, la sano, la akvo, la postrestaĵoj, la pensioj kaj aliaj servoj de socia asekuro, oni trudas privatigon de ili, kaj establas ankaŭ malpermeson reŝtatigi kiel publikan servon iun ajn jam privatigitan.

* Ili trudas ke tio permesata en Usono kaj Kanado, tio estu laŭleĝa ankaŭ en Eŭropa Unio. Tio minacas nian sanon kaj la medion: hidraŭlika frakasado por elpreno de hidrokarbidoj (*fracking*), genetike modifita manĝaĵo kaj la viando traktita per hormonoj devos esti permesataj sen limigoj.

* Oni malpermesas ĉian protektisman demarŝon, ekzemple en aferoj agrokulturaj kaj brutarbredaj. Eŭropajn agrokulturon kaj brutarbredadon oni forte damaĝos per kontraŭfronti en liberigita merkato nordamerikan agrokulturon tre intensan, industriigitan, latifundian kaj tro konsumantan biocidojn, agrotoksinojn kaj hormonojn.

* Sub argumentoj pri protektado de "aŭtorrajton" aŭ "intelekta aŭ industria proprieto", oni trudos ekscesajn leĝojn pri kopirajto kaj patentojn "Uson-tipajn", kiuj forte limigas la alireblon al la informo, la edukado, la scienca esplorado (eĉ medicino) kaj la kulturo, kaj oni uzos ilin por malvere legitimi la vigladon kaj spionadon de Interret-uzuloj (tiel, la liber-komercaj traktatoj agos kiel "Troja ĉevaloj" por enmeti tion kion ili ne sukcesis aprobi en antaŭaj traktatoj kiel la ACTA – "*Anti-Counterfeiting Trade Agreement*", "Komerca Konsento Kontraŭ Falsado").